


# ESPERANTA STILO

Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono  
Fédération du Languedoc-Roussillon des Centres Culturels pour l'Espéranto

Trimonata Bulteno / Bulletin trimestriel Jarabono / Abonnement = 20 F  
Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon PCK/CCP 956-28 F Montpellier

1a Kvinmonato 89 / 1<sup>o</sup> Trimestre 89

N° 108



## LEZIGNAN CORBIERES

\*\*\*\*\*  
...INTER MARO KAJ MONTARO...  
ATENDAS VIN  
JE LA 15A KAJ 16A DE APRILO  
POR LA FEDERACIA KONGRESO  
\*\*\*\*\*



Lézignan-Corbières troviĝas je 20 kilometroj  
okcidente de Narbonne  
sur la fervojo Carcassonne-Narbonne, sur N113, apud la  
"intermara" aŭtoŝoseo.

\*\*\*\*\*  
Kongresejo: MJC (Maison des Jeunes et de la Culture), Rue Marat.

### PROVIZORA PROGRAMO:

Sabato: Ekde la 10a h.: Ekspozicio pri Esperanto.

15a h.: Akcepto. Libro-servo.

16a $\frac{1}{2}$  : Spertoj: perkoresponda kurso; prezento de E° sur  
televidilo; tra Eŭropo per biciklo; gejunuloj...

18a $\frac{1}{4}$  : Prelego de Sro Benazet

19a $\frac{1}{2}$  : vespermanĝo : eblas surloke (35F)

20a $\frac{1}{2}$  : Distra vespero : lumbildoj, teatraĵo....

### Dimanĉo:

9a h : Estrara kunveno.

9a $\frac{1}{2}$  : Generala kunveno

11a $\frac{1}{2}$  : Estas esperata la vizito de 23-jara HUNGARO,  
Istvan ERTL, redaktoro de "Internacia Pedagogia Revuo",  
kiu prelegus pri literatura temo kaj respondus demandojn.

12a $\frac{1}{2}$  : Komuna tagmanĝo surloke (60F)

Posttagmeze: Turisma vizito : Muzeo de la Vito kaj Vino  
aŭ de la abatejo de Lagrasse.

\*\*\*\*\*

Praktikaj informoj: Bonvolu mem rezervi vian ĉambron ĉe:

Hôtel du Luxembourg: Tel. 68 27 07 52 aŭ Hôtel de la Gare: Tel 68 27 01 37

aŭ ĉe pli luksaj

Hôtel Tassigny: Tel. 68 27 07 52 aŭ Hôtel Le Grand Soleil: Tel. 68 27 01 20.

La MJC disponas 60 litojn en 3litaj ĝis 8litaj ĉambroj (speciale por gejunuloj sed ne nur)  
Kunporti dormsakon, oni povas lui littukojn (10F). Noktoprezco: 45F. Matenmanĝo: 15F

En Lézignan-Corbières ankaŭ troviĝas tristela tendumejo (malfermata je la dato).

\*\*\*\*\*

ATENTU : Pro la elspezoj de la sekretario, de la loka komitato, ktp, ni petas de ĉiu  
aliĝkoton de 20F (senpage por gejunuloj ĝis 25 j.).

Bonvolu resendi la aliĝilon sur la 2a paĝo plej rapide kiel eble por la bona organizado  
de la kongreso.

NI KALKULAS JE VIA ĈEESTO KAJ PARTOPRENO EN LEZIGNAN-CORBIERES. ĜIS !

\*\*\*\*\*

FEDERACIA KONGRESO EN LEZIGNAN-CORBIERES

A L I Ĝ I L O

NOMO:..... Antaŭnomo:.....

Adreso:.....

Telefonnumero:..... Naskiĝdato (nur por gejunuloj).....

Sabaton, la 15an de Aprilo -mi vespermanĝos en M.J.C...jes / ne  
 -mi tranoktos en M.J.C.....jes / ne


Dimanĉon, la 16an de Aprilo -mi matenmanĝos en M.J.C.....jes / ne  
 -mi partoprenos en la tagmanĝojjes / ne

Mi pagas la aliĝkotizon (20F) per banka/poŝta ĉeko  
 al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon (pĉk Montpellier 956 28P)

=====  
 Sendu la aliĝilon al:  
 Kultura Centro de la Orientaj Pireneoj por Esperanto-72, Avenue du Général de Gaulle  
 66000 Perpignan

Por pliaj informoj telefonu al la n° 68 34 22 18 aŭ al la sekretario de la federacio  
 4, Rue Docteur Rives 66000 Perpignan Tel:68 55 51 77 (dum la tagmanĝo aŭ vespere)

LEZIGNAN-CORBIERES



# VIVO de la GRUPOJ Béziers

*Lingvo-staĝo en Agde  
de la 4<sup>a</sup> ĝis la 7<sup>a</sup> de Majo.*

Venontaj kunvenoj: dimanĉon, la 2an de Aprilo je 14h30 en "Caserne St Jacques", en Majo, ne okazos kunveno pro la staĝo en Batipaume dimanĉon la 4an de Junio : Pikniko en Caùduro

Informo por ĉiuj grupoj : Kiel kutime, la lasta kunveno de la Béziers-a grupo okazos sur la kamparo. Ci-jare ni elektis Caùduro-n prezentitan de A.Sanz dum nia februara kunveno (vidu apartan raporton). ĈIUJ ESTAS KORE INVITATAJ. ←

Laùdezire, vi alvenos ĉu nur posttagmeze, ĉu (pli bone) jam ekde la mateno. Tiukaze alportu vian piknikon, seĝojn, manĝilaron, ktp. St Chinian-an vinon vi trovos surloke (eble senpage!!!). Ni kalkulas pri via partopreno por ekkoni la Ekologian Centron de nia regiono, pasigi agrablan tagon en pura aero kaj kuraĝigi nian sindoneman amikon A. Sanz, kiu multe laboris/as/os por ni kaj vi. GIS LA 4a de JUNIO en "VERDA OAZO"!

Caùduro situas inter St-Chinian kaj St-Pons (Hérault. RN 112); ĉirkaŭ je 12 km post St Chinian iru maldekstren D 179, poste, denove maldekstren D 179 E; ĉe la fino : Caùduro.

*NDLR: Kiu rezistos la allogon de la vino el St Chinian? Jen nova metodo por venigi pli da homoj al niaj renkontoj. Kompreneble hela vetero estas mendita. Ĝis !*

## Montpellier


Venontaj kunvenoj en la nova sidejo "Centre social des Allocations Familiales", Avenue de Barcelone en La Paillade :

- merkredon, la 12an de Aprilo
- merkredon, la 10an de Majo
- merkredon, la 7an de Junio.
- BONE NOTU LA DATOJN.

Ankaŭ legu la apartan artikolon pri la 12a "Semajno de Sète" en Septembro.

## PERPIGNAN

### ESPERANTO SUR MINITELO



Nova kodo : Post la malapero de la antaŭaj informoj la Kultura Centro en Perpignan sukcesis enirigi en Minitelon novajn informojn inter kiuj estas la listo de ĉiuj francaj federacioj kun adresoj de la sekretarioj. Provu do

36.15 INDEP, Rubriko G

*Kvankam tio ne rilatas al la grupo de Perpignan, sciu ke "KELI" (Kristanaj Esperantistoj) ankaŭ estas trovebla minitele per la kodo: 36.15+LECEP*

\*\*\*\*\*+KELI\*\*\*\*\*

Ce niaj najbaroj :

## AVIGNON

Kiel jam anoncite, la 6a Rodana E°-rendevuo okazos la 14an kaj 15an de Oktobro. Gvidos la grupojn : André Gente (novuloj), Sylvaine Le Magadure (paroliga kurso), Daniel Moirand (gramatika) kaj Claude Piron (prelega). Tiu lasta ne forgesos sian gitaron! Printempa pikniko okazos la 7an de Majo. Informas A. Gente, tel. 90 88 57 49

## TOULOUSE

*SFS prezentis al vi lastfoje "Eurokka", la E°-Rok-asocio, kiu celas promocii E-on ĉe gejunuloj per E°-rokmuziko. Jen pliaj informoj pri ĝi. Se vi loĝas oriente de la federacio, provu kapti la elsendojn.*

### PROGRAMME ESPERANTO

Mercredi 13h00-13h30  
Samedi 10h30-11h00



Radio FMR 89 MHz  
Rédaction ESPERANTO  
9 bis av. Frédéric Estève 31200 TLSE

### RENSEIGNEMENTS : (Cours, Stages, Livres, etc...)

## EUROKKA

Esperanto-Rok'Asocio

F31450 DONNEVILLE ☎ 61.81.95.65

Permanences tous les Mercredis de 13H00 à 14h15 à RADIO F.M.R.

Al tiu kolokvo venis tri konataj prelegistoj: S-ro Duc Goninaz, S-ro P. Janton kaj Dro A. Albault, kiuj parolis respektive pri "Planita internacia lingvo", "E° je la servo de la europa identeco" kaj "ebleco de monda kulturo", kompreneble en la franca. Tiu unua provo ne estis tiel sukcesa kiel atendite: komenco estas ĉiam malfacila. La celo estis la enkonduko de E° en la universitaton de Toulouse. Ni eventuale raportos pli detale en la venonta SFS.


1<sup>er</sup> Colloque Interuniversitaire sur la langue internationale

# QUAND L'ESPERANTO S'VEILLE ...

28 Février, 1 & 2 Mars 1989  
Université du Mirail



La 22an de Aprilo okazos en Tuluzo la studenta karnavalo. La esperantistoj partoprenos en ĝi per E°-ĉaro. Sur la ĉaro ludos E°-rokgrupo "La fuĝintoj el Alkatraz". La ĉaro estos ornamita per terglobo leganta E°-libron aŭ gazeton. Ni invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj dezirus partopreni tiun feston. (informis "Eurokka")



### 29aj Internaciaj Floraj Ludoj en la Jaro 1989a:

La verkoj prezentitaj en formato DIN A4, tajpitaj je duobla interlinio devas ampleksi ĉu minimume 14, maksimume 150 versojn, ĉu 2 paĝojn (prozo) minimume, kaj maksimume 12 paĝojn. Sendi po ses ekzempleroj ĝis la 30a de aprilo al la Sekretario de la Konservantaro: Joan Ramon Guñon i Roset, Carrer Vilamarí 106-108 baixos interior segona, E-08015 Barcelona Catalunya/Katalunio (Hispanio)

## FINANCOJ

Financa situacio de la Federacio je la 31a de Decembro 1988

Restis en la kaso (1.1.88) ..... 5584,11 F  
Enspezoj dum la jaro 1988

UFE (kotizoj) ..... 848  
 "Sudfrancia Stelo" ..... 2630  
 Vendo de poŝtkartoj ..... 48,30  
 " " prospektoj ..... 25  
 Ŝparkaso : profito ..... 127

### Elspezoj :

Sekretariejo ..... 610,24  
 SFS (4 numeroj) ..... 2267,74  
 Flugfolioj ..... 108,94  
 Libroservo ..... 1000  
 Stipendio (Habère) .... 227  
 Postĉekkonto ..... 5

Sumo de la enspezoj: ..... 3678,30 F de la elspezoj: ..... 4218,92 F  
 diferenco: ..... - 540,62 F


### En la kaso je la 31/12/88:

5584,11 - 540,62 = ..... 5043,49 F (5584,11 + 3678,30 - 4218,92)  
 Respektive: pĉk 551,49 F  
 ŝparkaso: 4492f ..... 5043,49 F

La kasistino : L.Négron

81-a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO  
 VICHY - 12-a ĜIS 16-a DE MAJO 1989





# CAUDURO

Dum la lasta kunveno de la "Cercle Biterrois d'Esperanto", S-ro Akiles Sanz, nova membro de la grupo, prezentis al ni kaj al Esperantistoj el Montpellier kaj Perpignan prelegon pri Mondhejmo en Caùduro.

La celo de Mondhejmo estas starigi internacian renkontejon por esperantistoj kaj ekologiistoj. La ekologiistoj lernu Esperanton, kaj la Esperantistoj disvastigu ekologian pensmanieron.

La asocio Mondhejmo fondiĝis antaù du jaroj laù la franca leĝo de 1901. Nuntempe ĝi havas iom pli ol naùdek membrojn, precipe el Francio kaj Germanio, sed ankaù el Hungario, Pollando, Belgio, Danlando, Kanado, Britio, Hispanio kaj Nederlando.

La enspezoj venas de la aliĝkotoj (300 F) kaj de la jaraj kotoj (50 F), ankaù de donacoj kaj de seninterezaj pruntedonoj.

En la vilaĝo Caùduro, je 40 km de Béziers, inter St Chinian kaj St Pons, troviĝis la dezirata loko por la realigo de la projekto. Estas suno kaj trankvilo, forestas polucio kaj bruo. La strato tien estas bona sed senelira, do la vilaĝo estas sen aùtotrafiko. Loĝas tie du emeritaj ŝafgardistoj.

Mondhejmo aĉetis tri ruinojn kaj 3000 m<sup>2</sup> da tereno. Dum la lasta somero membroj kaj amikoj pasigis sian libertempon je la preparado de la ruinoj por la rekonstruo. Estas planita du-etaĝa domo kun 170m<sup>2</sup> kaj preparo de la tereno kiel kampadejo.

Intertempe la rekonstruo komenciĝis pere de S-ro Sanz, kiu loĝas surloke. La daùrigado kaj rapideco de la konstruo dependas de la apogo ricevota de la membroj, aù de donacoj. Mi pensas, ke la Esperantistoj de suda Francio devus forte subteni Mondhejmon, ĉar tiel ili helpas konstrui internacian renkontejon en nia regiono.

Adreso: Mondhejmo/S-ro Sanz

Caùduro  
34360 St Chinian

Gisela Passarella.



## Franclingva resumo/ Résumé en français:

Pendant la dernière réunion du Cercle Biterrois d'Espéranto, Monsieur Akiles Sanz, nouveau membre de notre groupe, nous a présenté un rapport sur Mondhejmo (foyer du monde), ainsi qu'aux espérantistes venus de Montpellier et de Perpignan.

Le but de Mondhejmo est de construire un centre de rencontres internationales pour espérantistes et écologistes.

L'association Mondhejmo, fondée il y a deux ans et qui a des membres dans de nombreux pays, a acheté trois maisons en ruines et 3000 m<sup>2</sup> de terrain à Cauduro, à 40 km de Béziers, entre St Chinian et St Pons. Il est prévu de construire une maison de 170 m<sup>2</sup> et de préparer un terrain de camping.


Les recettes proviennent des cotisations d'adhésion (300 F), des cotisations annuelles (50 F), mais aussi de dons et de prêts sans intérêt.

La poursuite de la réalisation de ces projets dépend des membres et donateurs.

Tous les espérantistes du sud de la France se doivent de soutenir fortement Mondhejmo pour aider à construire ce centre international dans notre région.



RENDEZ-VOUS A CAUDURO LE DIMANCHE 4 JUIN; VOIR RUBRIQUE BEZIERS; GIS !



## INVITO al la 12a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

en la familia domo "Le Lazaret"-SETE.

*La kultura centro de Montpellier proponas al vi lerni aù perfektigi vian scipovon pri esperanto*

DE LA 16a ĝis la 23a de SEPTEMBRO 1989.



*Samtempe pasigu agrablajn feriojn en marborda ripozejo, kadre de agrabla familia domo, proksime de Montpellier.*

*Ci-tiun jaron la restado estos aparte interesa, ĉar ni kalkulas pri multe da alilandaj partoprenontoj, por krei vere internacian etoson.*

*Vi trovos plurajn nivelojn de E°-kursoj kaj ankaù...kanadon en la Mediteraneo, ekskursojn, belajn vesperkunvenojn kaj...bonan manĝaĵon.*

*Restadokosto kun tri manĝoj : 1050 aù 1155 F por la tuta semajno, laù la elekto de unu- aù du-lita ĉambro. Ehleco tendumi proksime.*

*Aliĝo/Informoj: Esperanto, 5 Rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier*



# LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO

## SudFrancia Perkoresponda Kurso

S/C Claude Cayzac Res. Pic Saint Loup - 171 Grand Mail - 34080 MONTPELLIER - Tel 67,75,37,65

### RAPORTO PRI LA PERKORESPONDA KURSO

#### Situacio je la mezo de februaro 89

Nia PerKoresponda Kurso, lanĉita antaŭ kvar monatoj tre bone funkcias, ĉe pli ol mi esperis, kaj verŝajne ankoraŭ multe kreskos pro la enkondukita taŭga metodo kaj la bonvolemluloj, kiuj sin propon(i)(a)os por helpi nin.

Ĝis nun mi enkomputerigis 100 francojn kaj 96 afrikanojn.

Jam trideko el ili kapabletas ekkorespondi;

Nun mi volas plifortigi nian agadon en nia propra Regiono; Jam 67 lernantoj t.e pli ol 67% de niaj francoj, loĝas proksime de ni. Tio tre gravas por nia estonteco.

Jam 6 perant(in)oj "reprezentas" la Centron en St Mamert (Nimes), Montpellier, Beziers, Carcassonne, Avinjono kaj Tuluzo. S-ino Mansel, profesorino kies edzo estas Kolegiestro en Noumea (Nova Kaledonio) sin proponas malfermi kurson pere de nia PKK-Sistemo en lia mezlernejo; ĉiu nova peranto estos bonvena; Eble LOME, (Togolando) baldaŭ plilongigos la liston. Speciala mencio al S-ino Gausen el St Mamert, kiu jam varbis dudekon da lernantoj.

Rilate al nia PKK-Centro, ni kreis nian propran PerKorespondan Servon, prizorgitan de S-ino Marie Hunninck, 259 bt D5, Le POU S DU PLAN - 84200 CARPENTRAS. (B.V sendi al ŝi, ĉiujn disponeblajn adresojn)

Ankaŭ amikino mia el Vroclavo (Wroclaw) Pollando, liveras al ni adresojn de siaj E-istaj samurbanoj. Mi intencas plivigli niajn ligilojn kun tiu grava pola urbo (700.000 enloĝantoj) Tiamaniere ni povos ebligi specialajn vojaĝojn inter niaj ambaŭ urboj, kaj viglajn amikajn rilatojn inter francoj kaj poloj.

Alia samideanino (S-ino Gausen) interesigas pri organizo de vojaĝoj; ŝi planas nuntempe vojaĝ-renkontoj kun niaj Katalunaj najbaroj el Barcelono. Ĉiuj ideoj por vigligi nian PKK-Centron estos bone konsiderataj.

Nun, mi enkollektigis la tutan Kursan-Sistemon, t.e: Metodo 4 + M.11 + M.12, kun lecionoj, ekzercfolioj, kromekzercoj, cirkuleroj, leteroj, ktp, (jam pli ol 100 paĝoj). Tio estas je via dispono por informo.

Mi deziras, ke nia PKK-Centro fariĝu pli kaj pli kolektiva laboro; Ĉiuj, kiuj partoprenas en nia agado kiel perantoj, korespond-servantoj, pedagogiaj konsilantoj, ktp, rajtas kunestri nian aferon; sugestoj, konsiloj ĉe kritikoj estas ĉiam bonvenaj. Nia celo devas esti plikreskigi nian PKK-Centron, kaj varbi novajn E-istojn por niaj kluboj.

Ni nepre bezonas, ke pli kaj pli el niaj membroj partoprenu en la AGADO;

Dek homoj laboras pli bone ol unu, ĉu ne ?

Lasta informo: Pro la fakto ke nia Centro larĝe superrandiras la limojn de nia urbo Montpellier, de nia departemento Herault, ĉe de nia Regiono Langvedoko, pro noma analogio kaj planota kunlaborado kun nia tre bona Regiona Gazeto, S.F.S, mi proponas nomi nian PKK-Centron: Sud-Francia PKK-Centro; Ĉu vi konsentas ?

Mi kore salutas vin, samideane via:

  
Claude Cayzac

Montpeliero, 89.02.12.

NDLR: Gratulojn! Bonvolu noti, ke temos pri tiu perkoresponda kurso en Lézignan-Corbières, la 15an de Aprilo.

La ĉi-suba artikolo aperis en la januara bulteno de Sat-Amikaro, okaze de la kongreso de Pézenas. Sat-Amikaro afable permesis al SFS ĝin represi. Ni tutkore dankas kaj esperas, ke iu en la federacio bonvolos raporti pri la 44a Sat-Amikara kongreso.

# LA HISTORIO DE URBO PÉZENAS

**F**AMIGINTA kiel kunvenloko de la Langvedokaj Ŝtatoj kaj pro restadoj de guberniestroj Montmorency kaj Conti, urbo Pézenas, kiu situas meze de departemento Hérault - inter la Langvedoka marbordo kaj internaj montoj, estas ankaŭ konata pro la oftaj restadoj de Moliero kaj ties *Brila Teatro*, kiu fariĝis sur loko La Grange-des-Prés *Komediistaro de la Langvedokaj Ŝtatoj kaj de Lia Princa Moŝto Conti*.

Tamen la fakto, ke ĝi estis la sidejo de provinca konsilantaro, ĝia politika bonŝanco kaj la oftaj restadoj de la *Granda Komediisto* multe vualis ĝian ekonomian rolon, kiu datumas de plej antikva tempo.

Okaze de plugado antaŭ 20 jaroj, la elterigo de nekropolo Sankta Juliano, kies enhavo datumas de la 7-a jarcento antaŭ Kristo, atestas la gravajn interŝanĝojn laŭlonge de rivero Peyne (el kiu devenas la nomo de la urbo) kaj de rivero Hérault, inter la marbordo kaj la interna regiono.

La Romia epoko atestas nediskuteblan disvolvigadon. La urbo fieris pri la titolo *Kolonio de Latina Juro*, kiu havigis al ĝi famon kaj unuarangecon en la malsupra kaj meza partoj de la valo de rivero Hérault. Plinio la Maljuna laŭdis la lokajn industrion kaj porlanan bredadon.

Tiu prospero malprogresis ekde la 4-a jarcento, kaj same kiel ĉiuj aliaj urboj de la Narbona provinco urbo Pézenas suferis de la ĝenerala malkreskiĝo okazinta pro krizo de la Roma imperio kaj pro la Barbaraj invadoj.

Dum pli ol 4 jarcentoj, antikva urbo *Piscenae* estos metita en plej kompletan forgeson.

Ekde la 9-a jarcento, sekve de heredoj kaj kontraktaj inter feŭdestroj la urbo apartenis al posedantoj diversaj: grafoj de Agdo, vicgrafoj de Albiĝo kaj Nimeso. En la jaro 1209, okaze de la krucmilitiro kontraŭ la Albigensoj la urbo fariĝis posedaĵo de grafo Simon de Montfort.

Estiĝinta *Reĝa Urbo* en la jaro 1261, ĉar Ludoviko la Sanktulo aĉetis ĝin de heredantoj de riĉa burĝo el Montpeliero, kiu mem estis ĝin aĉetinta el grafo Simon de Montfort, urbo Pézenas oficiale ricevis fine de la Centjara Milito — la 28-an de Marto 1420 — la privilegion havi blazonon garnitan per delfeno sur orkolora kvarono, pro rezistado al Angloj kaj al Burgonjanoj, kaj pro fideleco al kronprinco Karlo — tiel nomata *reĝo de urbo Bourges*, kiu fariĝos Karlo la Sepa — reĝo de Francio.

Tiam riĉigis kaj famigis urbon Pézenas multaj reĝaj favoraĵoj, kiuj rekompencis fidelecon: restarigo de foiroj kaj privilegioj iam forigitaj de la Burgonjaj komisaraj profite por urbo Béziers.

Pro renkontiĝo inter feŭda dinastio Montmorency-Damville (nobelaj landestroj en provinco Ile-de-France, promociitaj al guberniestreco de Langvedoko), kiu estis fremda al la provinco, kaj institucio tipe regiona (Langvedokaj Ŝtatoj), ekde la 16-a jarcento estiĝos la politika bonŝanco de urbo Pézenas.

Sur loko La Grange-des-Prés loĝis la guberniestro kaj la Langvedokaj Ŝtatoj, kiuj entute havos 40 sesiojn. Perfekta estis la akordo inter la guberniestro kaj la Provincaj Ŝtatoj. La absoluta monarkio komence eĉ proksimigos ilin, sed poste ankaŭ defaligos ilin kune.

La jaro 1632 stampis urbon Pézenas per la apogeo de la provinca konsilantaro, kies sidejo ĝi estis. La provinco ribelis kontraŭ kardinalo Richelieu. La urbo kontraŭis al Parizo. La sekvoj estis katastrofaj: la Langvedokaj armeoj suferis malvenkon sur loko Castelnaudary — duko Henriko la Dua (dinastio *Montmorency*) estis arestita, ekzekutita — la kastelo de urbo Pézenas estis malkonstruita.

Langvedoko malhavis sian guberniestron, siajn Ŝtatojn. Urbo Pézenas perdis sian grandsinjoron loĝintan sur loko La Grange-des-Prés, kaj sian politikan bonŝancon.

Meze de la 17-a jarcento, la urbo revigliĝis. Post la ekonomia bonfarto en la Mezepoko, post la grava politika rolo en la 16-a kaj 17-a jarcentoj, tiam sur la arta flanko urbo Pézenas ludis unuarangan rolon.

La kortegaj brilo kaj pompo de nova guberniestro Armand de Bourbon (Conti) altiris la artistaron, la muzikistojn kaj la komediistojn. Moliero kaj lia trupo restados plurfoje en urbo Pézenas, inter la jaroj 1650 kaj 1657. Ili komediis jen por la guberniestro kaj ties kortego sur loko La Grange-des-Prés, jen por la Ŝtataj deputitoj, jen por la « simpla popolo » de urbo Pézenas, en salonoj, en polmoludejo aŭ sur diversaj placoj. Okaze de siaj komedioj Moliero memoros siajn restadojn en urbo Pézenas.

Sed princo Armand de Bourbon, kiu estis frivola kaj amiko de artistoj, tre baldaŭ fariĝos bigoto kaj malamiko de teatro sub la influo de sia edzino kaj de sia konfesprenanto. Tiam Moliero forlasis urbon Pézenas kaj Langvedokon, por iri al Parizo.

Princo Armand de Bourbon mortis en la jaro 1666. La Langvedokaj Ŝtatoj la lastan fojon havis sesion en urbo Pézenas en la jaro 1692. Ekde tiam la urbo perdis sian unuarangan rolon.

Notindaj estas la graveco kaj riĉeco de la foiroj sur loko Pézenas-Montagnac en la 18-a jarcento. Eĉ se tiuj foiroj neniel egalas la Mezepokajn, ili atestas seriozan komercan vigecon, kiu tamen mallonge daŭros.

Unue, la naskiĝanta industria koncentriĝo ĉesigis multajn lokajn aktivecojn. Poste, la konstruado de fervoja linio, inter Mediteraneo kaj Atlantiko, ebligis rektan komunikadon inter Bordoza kaj urbo Cette (nuna ortografio: Sète), flankklasante urbon Pézenas, kiu spertis longan izolitecon kaj malprogresan periodon. Ĝi fariĝis urbo de nur vinberistoj kun sekve la tiama malbona ŝanco de la vinkulturo.

En malnova urbo Pézenas, ne troviĝas imponaj rimarkindaj monumentoj. Sed en la urbo — en la tuta urbo — estas kaŝitaj arkitekturaj belaj. Ilin vi malkovros, strato post strato, dank'al societo Pézenas-Amikaro, kiu starigis taŭgan itineron tre klare indikit-an per sagoj.

Malkovro de malnova urbo Pézenas neniel similas al kutimaj turismaj travagadoj. La urbo daŭre vivas kiel en iama tempo. Per diversaj elmontradoj de artoj, teatro, muziko kaj folkloro ĉiusomere aranĝo *Miron-dela dels Arts* vigligas la pitoreskajn stratojn de la Mezepoka kvartalo, kies nomoj estas elvokaj. Malfermiĝas budoj, butikoj malnovaj, kie artistoj kaj metiistoj laboras same, kiel en la tempo de Moliero.

Jean Servières,

Prezidanto de societo Pézenas-Amikaro.



# CIFEROJ

1,2,3,4 : Politikuloj sin esprimis pri la nombro da lingvoj, kiujn gelernantoj devus lerni. La prezidanto de la regiona komitato ekonomia kaj socia plurfoje insistis en la gazetaro, ke ĉiu en nia regiono devus paroli la anglan. La Prezidento kaj Ĉefministro deziras, ke ĉiu junulo parolu 2 aŭ 3 lingvojn (la alproksimiĝo de 93 klarigas tiun subitan ekkonscion). Jacques Delors, kiu mem konfesis, ke li estis malbrila lernanto koncerne lingvojn, opinias, ke ĉiu junulo devus posedi... minimume 3 aŭ 4 lingvojn. Kiu diros pli?

14: La Ministro pri Edukado respondis malfavore al deputito pri la enkonduko de E° en la programojn. Li asertis, ke jam 12 lingvoj (la angla, germana, hispana, itala, portugala, rusa, araba, hebrea, ĉina, japana, nederlanda, pola) estas proponataj en kolegioj kaj du pliaj (la dana kaj la greka) en liceoj. Praktike oni ĝeneraligos la duan lingvon en la kolegioj nur en venonta septembro, la nombro da instruhoroj kaj da lerneblecoj de lingvoj malkreskis kompare kun antaŭ 10 jaroj kaj en la liceoj la nombro da gelernantoj en ĉiu klaso ne malkreskis. En aliaj respondoj tiu Ministro uzas argumentojn, pri kiuj ni raportos alifoje.

3000: Okaze de televid-elsendo J. Delors diris sian kontenton pri "la bonega skipo de milo da interpretistoj-tradukistoj, kiuj laboras en Bruselo". Li ankaŭ asertis, ke la 9 lingvoj de la eŭropa komunumo estas egale traktataj en Bruselo. La usona magazino "News-week" de la 6a de Februaro esprimis sin iom malsimile. Ekzemple la Irlandanoj rezignis pri la presado de ĉiuj "eŭro-dokumentoj" en la irlandano. Pli ol 3000 interpretistoj ĉeestas ĉiujare 8600 plurlingvaj renkontiĝojn kaj tio reprezentas 105 000 "interpretist-tagojn".

810 000: estas la nombro da paĝoj de "euro-tekstoj" tradukitaj en 1987, feliĉe nur en la tri labor-lingvoj : la angla, la franca, la germana.

Pri la glata funkciado de la "afero", la ĝejnalistoj ne havis tre bonan impreson, asertante, ke kompare la turo de Babelo estis pinaklo de klareco (apuda desegnaĵo). Kiam vi voĉdonos en Junio, ne forgesu demandi la partiojn, la kandidatojn, ktp, kiel ili taksas tiun misfunkciadon.

9 el 10 "komunum-sekretarioj" eĉ kun la aĝo de 45 jaroj, prefere ol emeritiĝi, estas maldungitaj pro "kompleta malkapabliĝo", kun tamen 70% de la salajro por la resto de la vivo. Kompreneble (tio estas mia klarigo) la konstanta uzo de pluraj lingvoj elĉerpas.

212 000 dolaroj reprezentas la makler-pagon jaran de la "komision-prezidanto", kiu ricevas 15 000 dolarojn por distriĝi... Abundas en tiu artikolo detaloj pri la avantaĝoj en Bruselo, ankaŭ pri la profitemuloj. Se la frontpaĝa titolo estas "la caro de Bruselo", la "portreto" de S-ro Delors estas pozitiva.

10 000 estas la nombro da "Eŭrokratoj", kiuj loĝas en Bruselo. Kiel ili konsideras la hejmurbon? (laŭ la artikolo) kiel la simbolo de la urbo, la "pisanta vireto" (Manneken Pis)...

8,5 miliardoj (bilionoj) da homoj post 40 jaroj (fakte en la jaro 2025)

SFS jam aludis pri tiu konjekto, kiun detale priskribas "ça m'intéresse" de la lasta februaro. Tiu cifero reprezentas la duoblon de la nuna monda loĝantaro.

Francio fariĝus la unua eŭropa lando kun 60 milionoj. Jen aliaj ciferoj; ne forgesu, ke ili rilatas al la graveco de la diversaj lingvoj.



ILLUSTRATION BY ROBERT NEUBECKER  
**Nine official languages:** *By comparison, the Tower of Babel was a pinnacle of clarity*



1500 milionoj vivos tiam en Ĉinio kaj Hindujo, 350 en Sovet-Unio, 300 en Usono kaj Nigerio, proksimume 250 en Pakistano, Indonezio, Brazilo, Bengladeŝo.  
 Superos 100 milionojn: Meksikio (150), Japanio (128), Irano, Vjetnamio, Etiopio, Filipinoj; Sekvos Zairio (100), Egiptio kaj Korejo (94)...

249 esperantistaj scienculoj el 47 landoj kaj pli ol 100 universitatoj kunlaboris en la dujara AIS (Internacia Akademio pri Sciencoj de San Marino). Oni intencas kontakti pliajn 225. La ĉefa labor-lingvo estas esperanto.

419 esperanto-aranĝoj estas listigitaj en la "Turisma esperanto kalendaro" de "Monda Turismo". Koncerne Francion, nur tri eventoj estas indikitaj aldone al Gresiljono, kiu estas kalkulata kiel unu "konstanta" evento. Ĉu estus mensogo aserti, ke pli ol mil aranĝoj tra la mondo estas proponataj al la esperantistoj? Ĉiutage okazas io en Esperantujo.

15-16/4 kaj 4-7/5 estas la plej gravaj ciferoj por nia federacio. Je tiuj datoj okazos nia federacia kongreso en Lézignan-Corbières kaj la lingva staĝo en Agde. Ni atendas... 10-ojn da personoj, SPECIALE VIN, kara leganto!



*Pardonu, se tiom da ciferoj tedis aŭ lacigis vin. Espereble kelkaj ciferoj ne lasis vin indiferentaj kaj venontfoje ni povos legi en SFS la reagojn de kelkaj esperantistoj. Surprize malmultaj leteroj atingis la "redaktorejon" por tiu numero de SFS. Same la raportoj de la grupoj estas eksterordinare magraj. Ĉu malsevera vintro malmoligis niajn federacianojn? Materialo abundis por la n° 107a, espereble tiel estos por la venonta. SFS ankaŭ dependas de VI! Anticipan dankon.*

J.H.

## FERIAJ RENKONTIĜOJ

### Lerni kaj ferii en Grésillon

La «Kulturdomo de Francaj Esperantistoj» Grésillon, estas kooperativa societo fondita en 1951. Ĝi posedas la bienon kun kastelo kaj 17-hektara parko. Ĉiujare ĝi organizas diversgradajn kursojn, prelegojn, distraĵojn kaj ekskursojn en la regiono.

Ĉijare okazos:

- ★ de la 31-a de marto ĝis la 7-a de aprilo — Internacia Renkontiĝo de Infanoj;
- ★ de la 16-a ĝis la 30-a de junio — Internacia Amika Renkontiĝo kun nedeviga programo;
- ★ de la 2-a ĝis la 17-a de julio — Prelegoj okaze de la 200-jara datreveno de la Franca Revolucio;
- ★ de la 18-a ĝis la 31-a de julio — Lernejo kaj praktiko;
- ★ de la 1-a ĝis la 14-a de aŭgusto — Omaĝo al Edmond Privat — prelegoj kaj kursoj;
- ★ de la 14-a ĝis la 28-a de aŭgusto — Somera Lernejo.

La Fonduso Belbona Espero donas kelkajn subvenciojn al nefrancaj gejunuloj, kiuj deziras ĉeesti studperiodon en Grésillon. Skribu al Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé.

### 45a Internacia Junulara Kongreso

16 - 23 julio 1989

Kerkrade - Nederlando

## t r a n s p o r t o

### Informoj:

sekretario de LKK:  
 Op den Akker 16  
 NL - 5925 CB Venlo  
 (tel: +31 77 827 697)


### Kultura Centro Esperantista pf 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando

atendas vin la tutan jaron: entuziasmiga Esperanto-vivo, variaj manĝoj, komfortaj ĉambroj, saniga vivo en la montaro.

Venontaj Esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj: 20-25 marto, 24-29 aprilo, 22-27 majo, 19-24 julio; ĉiusemajne ekde la 10.VII. ĝis la 12.VII. ktp.

Aliaj aranĝoj: 25-27.III. La montaro Ĵuraso ekprintempe, kun C.Gacond; 3-8.IV. Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj, kun C.Gacond, F.Degoul kaj S.MacGill; 6-7.IV. Oficialaj Esperanto-ekzamenoj laŭ la normoj de UEA/ILEI; 13-15.V. Studa semajnfino pri arbaro, kun J.Pachter; 15-20.V. Seminario pri la nomoj de sovaĝaj plantoj, kun B.Eichhorn kaj R.Bossong; 10-22.VII. Intensiva Pedagogia-Metodika kurso kun I.Szanser. Ekde la 17-a de julio ĝis la mezo de septembro: tre riĉa kurs-programo.

Petu la detalan informilon ĉe la supra adreso.



SFS disponas pri detalaj informoj pri la aranĝoj de Gresiljono kaj volonte sendos ilin al vi.  
 Vi povas ankaŭ rekte telefoni al la "Kultura E°-domo"  
 41 89 10 34 aŭ 40 76 77 95

### DU REKOMENDINDAJ (novaj) BULTENOJ :

"Provence esperanto": le bulletin qui fait clic quand tous les autres font clac!  
 Bone ilustrita, formato kiel SFS, multaj argumentoj, trimonata. 20F al "Fédération des centres culturels d'E° de Provence", pĉk4157-40 F Marseille aŭ ĉeko al S-ino Loisel, Tour Vadon. 83700 St Raphaël


"Esperanto 95" Se poser sans s'opposer, s'exposer sans s'imposer (stariĝi sen kontraŭstari, elmeti sin sen altrudi sin)  
 Dulingva trimonata revuo; abono: 6 Ekuoj al pĉk La Source 35 766 17 T (adreso: 8, Rue de l'église 95520 Osny (adreso de "Interland")). Agrabla prezento; ĝia dulingveco estas originala ideo por lingva trejnado. Aperis la 1a numero, ni atendas la aliajn!

\*\*\*\*\*



# ĈU BRITUMI ?

aù alivorte : ĉu ferii en Britujo?



Tuj esperantistoj havas malfavoran impreson pri kongresoj; ili opinias, ke tie okazas nur seriozaj diskutadoj kaj prelegoj.

Nu, internacia kongreso estas okazo por vojaĝi kaj malkovri alian landon, praktiki la internacian lingvon kun esperantistoj el diversaj kontinentoj, aù simple turismi.

Por la Francoj Britujo restas aparta lando, kie oni aùtadas maldekstre, ktp.

Ĉu vi scias, ke la ĉi-supra orient-aspekta palaco troviĝas en suda Britujo, ĉe la marbordo, tre precize.....en Brajtono (Brighton), kie okazos la venonta universala kongreso, de la 29a de julio ĝis la 5a de aùgusto?

Sed la evento de la UK ne estos la sola en Britujo dum la somero. Unue (1) okazos la 7a Ekumena kongreso de IKUE/KELI apud Uckfield de la 22a ĝis la 29a de Julio. Antaùkongreso kaj solena lanĉo<sup>(2)</sup> de la UK estas programitaj en Londono (27-29 VII). Dum la tuta semajno de la UK<sup>(3)</sup> eblas partopreni en ekskursoj duontagaj por ekkoni la urbon kaj la ĉirkaùaĵojn.

Tuta tago (merkrede) estas rezervita por divers-specaj ekskursoj en la regiono aù al la ĉefurbo (4). Postkongresoj okazos dum tuta semajno (5-12 VIII) en diversaj provincoj de la lando : en Suda Kimrujo (5) (ILEI/geinstruistoj), en Norda Kimrujo, ĉe la marbordo, (6), en Irlando (Dublin)-7, en Skotlando (Edinburgo)-8. Kursoj diversnivele sub la gvidado de Dro M. Boulton estas planitaj en Barlaston-9-de la 12a ĝis la 18a de Aùgusto. Vojaĝagentejo (en Usono!) proponas post-kongresan vojaĝon aùtobuse (10) de la 5a ĝis la 13a de aùgusto "tra belaj kastelurboj kaj naturo de Anglio kaj Skotlando kun akompano de la fama Esperanto-poeto W. Auld!" SFS jam menciis aùtomobilistan karavanon tra Britujo de la 5a de Aùgusto ĝis la fino de la monato. Partopreno en la UK



ne estas deviga kompreneble; renkontoj kun esperantistoj estas antaùviditaj kaj la vojirado koincidas kun diversaj festoj kaj festivaloj. Informas pri tiu karavano J. Hénin 48500 La Canourgue, tel. 66 32 86 36.

Laste la grupo de Arles (11, Rue Paul Langevin) planas karavanon al Brajtono de la 25a de Julio ĝis la 18a de Aùgusto kun etapo en Gresiljono, Parizo, Calais, Gray, La Chaux de Fonds, ktp.

Pri Gresiljono kaj La Chaux de Fonds ankaù vidu la detalajn anoncojn (en tiu numero)

Se Britujo ne allogas vin, kial ne ĉeesti esperanto-aranĝojn en Bulgario, Ĉekoslovakio, Germanio (Sat-kongreso en Bavario 5-12 VIII), Hispanio (Nacia kongreso en Bilbao: 17-22 VII), Hungario, Italio, Jugoslavio, Kanado, Malagasio, Malto, Nederlando, Pollando, Sovet-Unio, Svedio, Svislando, Turkio, Usono, Zairio... ne forgesante Francion (nacian kongreson en Vichy, lingvan staĝon en Agde -4-7 V, tutan semajnon en Sète 16-23 IX) ?

Pri viaj spertoj ne forgesu informi SFS ! Antaùdankon !



# ★ ESPERANTO ET PHILATÉLIE ★

Extraits de la chronique de Jean Amoureux paraissant dans "La philatélie française".



Figure 3

I.F.E.F. sera créée le 4 août 1948 à Amsterdam alors que simultanément se tenait le 21<sup>e</sup> congrès de S.A.T. Trois pays composaient I.F.E.F. à l'origine : Pays-Bas, Danemark et France.



Figure 7

Sur le plan national les cheminots espérantistes français constituent « Franca Fervoista Esperanto-Asocio » (F.F.E.A.) qui, dès 1947, devient membre d'U.A.I.C.F. Sa présidente, G. Lemonnier, sera à Strasbourg le 15 novembre 1952 pour la fondation de la F.I.S.A.I.C. à laquelle adhère I.F.E.F.

Après le 3<sup>e</sup> congrès à Paris en 1951, le 21<sup>e</sup> en Avignon en 1969, pour la troisième fois un congrès d'I.F.E.F. se déroule en France, le 40<sup>e</sup> à Perpignan cette année présente.

Le congrès d'Avignon a eu un cachet postal temporaire les 19, 20 et 22 mai 1969. Celui de Perpignan également le 7 juin 1988 (Photo 3). Texte mis à part, le cachet de Perpignan est de même facture que celui du « point philatélie » de la R.P. de Perpignan (Photo 4) puisque tous deux représentent le blason de la ville.

Dès la fin de l'essentiel du congrès de Perpignan une délégation s'est rendue à Nogent-sur-Marne où, le 11 juin, était célébré le cinquantième de l'U.A.I.C.F. avec mise en service d'un cachet postal temporaire (Photo 5).

Pour en terminer avec le congrès de Perpignan je voudrais signaler le travail remarquable présenté par la Commission de terminologie qui, avec l'accord de l'« Union Internationale des Chemins de Fer » (U.I.C.) apporte sa contribution à la traduction pour la partie espéranto du « Lexique technique ferroviaire de la S.N.C.F. » dont la dernière édition comprend 10 204 termes. Cette commission poursuivra son travail en participant à l'élaboration du dictionnaire des définitions qui paraîtra ultérieurement. Dès 1950 André Elondeux avait été la cheville ouvrière de ce travail fondamental.

Les Italiens emboîtent le pas : « 1. congresso italiano del II secolo » (« 1<sup>er</sup> congrès italien du II<sup>e</sup> siècle ») indique la flamme en langue nationale mise en service pour le 59<sup>e</sup> congrès italien d'espéranto à Benevento, du 26 août au 2 septembre 1988 (Figure 2). Ce même congrès a eu un cachet manuel (Figure 3).

Le 73<sup>e</sup> congrès universel s'est déroulé à Rotterdam du 23 au 30 juillet 1988 et le cachet postal en espéranto est illustré du symbole qui avait été choisi pour le centenaire de l'espéranto (voir la chronique de juin-juillet 1987). Je me demande si au fil des années ce symbole appelant le rapprochement Nord-Sud ne va pas pousser au rang de l'Histoire l'étoile verte évoquant les cinq continents! Au-delà du graphisme c'est tout un programme et il suffit de suivre l'évolution du mouvement espérantiste pour s'en convaincre.



Figure 2

Sur le plan philatélique disons que le cachet postal commémoratif était oblitérant. Les plus ayant circulé ont reçu par ailleurs l'empreinte du cachet à date, invariablement le 23 août. Ce cachet ordinaire de « Rotterdam De Doelen » est donc celui du Palais des Congrès où 2 316 usagers de la langue venus de 63 pays étaient réunis. Ce cachet à date manuel indiquait généralement le chiffre 1, plus rarement le 2 (Figure 4).

Philatéliquement la Chine est le pays qui a célébré le centenaire de l'espéranto avec le plus d'éclat : 1 timbre, une quarantaine d'oblitérations postales diverses « premier jour », le 26 juillet 1987, jour du centenaire, sans parler de l'émission à caractère officiel d'enveloppes et de cartes commémoratives. 1



Figure 4

Du 10 au 16 août 1988 s'est tenue à l'Academia Sinica de Pékin la 2<sup>e</sup> Conférence internationale pour l'application de l'espéranto dans la Science et la Technique. Plus de 1 400 scientifiques espérantistes y participaient dont plus de 100 de



Figure 7

22 pays différents. La Conférence a reçu plus de 300 dissertations. C'est un fait très important, sans précédent et porteur, puisque 8 résolutions ouvrent l'avenir. Il est déjà prévu que la prochaine Conférence de ce type aura lieu à Pékin du 25 au 30 mai 1990.

Celle de cette année-ci a eu un cachet postal temporaire bilingue (Figure 7). L'Office des Postes de Changshu a édité l'enveloppe commémorative dessinée, tout comme le cachet postal, par l'artiste espérantiste Zhang Linrui (Cansio).



Figure 8

Sur toutes ces perspectives encourageantes, bonne année 1989 à tous.

Une question toutefois avant de terminer cette chronique.

Je possède quelques vignettes de forme, de couleurs et de dessins différents surchargées en espéranto : « KONGRESO DE / ESPERANTO / PARIZA FEDERACIO / 21 MAJO 1933 / MONTMARTRE » (Figure 8).

Qui pourrait me donner des renseignements sur cette série de vignettes de la « Commune libre de Montmartre » ?

Jean AMOUROUX

## S O L V O J

Krucvorto] de la n° 107a.

Horizontale: I. Glaciaĵist'. II. Redingoto. III. Akord' - Kara. IV. Caro. Delic' V. Ino. Barako. VI. ut-ko-ojor. VII. Leporoj. Jo. VIII. Itiner'. IX. Nostalgio X. Ojt' - Lokalo.

Vertikale: 1. Graciulino. 2. Lekantetoj. 3. Adoro-Pist'. 4. Ciro. Kont'. 5. Ind. Boreal'. 6. Ag' - da - orlo. 7. Ĵokeroj. 8. Italaj-Lia. 9. Sorikoj-ol. 10. Acoroj.

## Anagramoj:

Mediterranea fiŝo: kasto-rusto-ikarĝ-zorgi-olivo-frato-rango-iriso-servo-oferi: KRIZOFRISO

Medikamenta likvoro: ekrano-letero-impeto-karabo-saluto-italoj-ripozo-oblato: ELIKSIRO

Fama raguo: karabo-angilo-serako-urtiko-latiro-edzino-telero-oblato KASULETO

Provenca supo: berilo-unesko-julepo-aprilo-botelo-ermito-struto-oktano BUJABESO

# LUOOJ

proponitaj de René Raynaud



**SILAB-ENIGMO** : AP - CE - DI - DO - DRE - E - EK - EN - FA  
 GA - GLI - GO - IT - KRIN - LE - LI - LI  
 LO - MA - MO - NA - NO - NO - NO - NO - O  
 O - O - RA - RA - RI - RO - RO - RO - SA -  
 SPEL - TAF - TO - TO - TO - TRA - U-VEN-VO.

El la ĉi-supraj 44 silaboj formu 16 vortojn kun la sube indikitaj signifoj (la nombro da punktoj montras la nombron da literoj). Se la ĝustaj vortoj estas trovitaj, iliaj unuaj kaj triaj literoj, legataj de supre malsupren, donas la tekston de la unua el la tri postuloj, kiujn D-ro Zamenhof starigis kiel kondiĉojn de helplingvo.


- |                                |                                 |
|--------------------------------|---------------------------------|
| 1. Homa glando . . . . .       | 9. Ĝirmilo . . . . .            |
| 2. Sovaĝa porko . . . . .      | 10. Greno . . . . .             |
| 3. Rabobesto . . . . .         | 11. Brila ŝtofo . . . . .       |
| 4. Malforta metalo . . . . .   | 12. Ventego . . . . .           |
| 5. Astronomia punkto . . . . . | 13. Enkraniaĵo . . . . .        |
| 6. Mineralo . . . . .          | 14. Bakaĵo . . . . .            |
| 7. Tago . . . . .              | 15. Glanda sekreciaĵo . . . . . |
| 8. Markrustulo . . . . .       | 16. Kambio . . . . .            |

respondo: .....

**LA MAJSTRO PAROLAS** : El la sekvantaj 12 vortoj prenu tri sinsekvajn literojn. Kunigitaj ili donas la tekston de la lasta frazo, kiun D-ro Zamenhof skribis kaj kiun oni trovis kiel fragmenton de komencita artikolo kraĵone notita sur lia skribotablo.

Mielo - akselo - mantilo - bosketo - meblaro - emocio - presarto - neeblo - instalto - rosmaro - korklapo - heroo.

**ENIGMA SPIRALO** : Sekvante la numerojn, enskribu en la spiralon la vortojn kun jenaj signifoj :



- 1-7 homa glando
- 6-11 aganta konforme al leĝoj
- 10-13 rezina solvaĵo
- 12-18 romana taĉmento
- 17-21 trinkparolo
- 20-23 teksaĵo
- 22-25 herbaĉo
- 24-31 speco de monprunto
- 30-35 malagrabra sento
- 34-37 floro
- 36-42 ĉiela zono
- 41-48 muzikprezento

La lastaj du literoj de ĉiu vorto estas ĉiam la komencaj literoj de la sekvanta vorto.

- Kiam la ĝustaj vortoj estas trovitaj, la lokoj:
- 26+5+22+47+13+43 nomas faman anglan poeton .....
  - 36+31+6+40 nomas faman anglan poeton .....
  - 4+44+14+39+24+10+45+16 nomas faman germanan poeton.....
  - 20+33+32+19+1+42+8 nomas faman rusan poeton .....

(El "Miru, Pensu, Ridu" de Paul Bennemann)

LA VENONTA NUMERO DE "SUDFRANCIA STELO" APEROS FINE DE JUNIO.  
 BONVOLU SENDI VIAJN KONTRIBUOJN ANTAŬ LA 7A DE JUNIO AL LA KUTIMA  
 ADRESO : JEAN HÉNIN -ROUTE DE MONTCAYROUX - 48500 LA CANOURGUE.